



# 9-A EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO DE EŬROPA ESPERANTO-UNIO



# KONGRESA ORGANIZA KOMITATO

## 9-A EŬROPA ESPERANTO-KONGRESO DE EEU

Ĉeftemo: Lingvolernado en EU: Lerni pli - kosti malpli



### **Kongresa Organiza Komitato:**

Prezidantino: Maja Tišljar

Membroj: D-ro Seán Ó Riain

Flory Witdoeck

Zlatko Tišljar

Alan Behan

**Organizanto: Eŭropa Esperanto-Unio**

**Loka organizanto kaj organizanto de ekskursoj:**

**BEM Ireland**

Eldonis: Eŭropa Esperanto-Unio

Bruselo, 2012

## SALUTVORTO DE LA PREZIDANTO DE EEU

*Céad míle fáilte romhaibh go léir, go hÉirinn agus chun na Gaillimhe* (cent mil bonvenojn al Irlando kaj al Galivo mi deziras al vi!).

Vi venis al Irlando por aparta grava kongreso de EEU pro pluraj kialoj: unue, pro la temo; due, pro la loko; kaj trie, pro la granda progreso de Esperanto en Eŭropo dum la lastaj jaroj kaj la neceso strategie konsideri kiel daŭrigi tiun progreson.

La temo estis jam interesa kiam la estraro de EEU elektis ĝin antaŭ tri jaroj, sed intertempe, pro la monda ekonomia krizo, ĝi fariĝis eĉ pli aktuala. La oficiala lingvopolitiko de EU, decidita en la barcelona Eŭropa Konsilio de 2002 far la ŝtatestroj de ĉiuj EU-landoj, estas ke ĉiu civitano studu 3 lingvojn – la denaskan kaj 2 aliajn. La ĉeftemo de nia kongreso, “Lingvolernado en EU: lerni pli, kosti malpli”, tute kongruas kun tiu politiko de EU, aparte pro la rekomendo de la Civitansocia Platformo por Multlingvismo ke “*endas esplori kiu dua lingvo pli kuraĝigas la lernadon de la tria lingvo*”. Tio malfermas pardonon por la pli vasta apliko de la brila brita programo “Lingvolanĉilo”, pri kio ni multe aŭdos dum la kongreso. La Platformon renovigis EU-Komisiono antaŭ 3 semajnoj. La loko kie ni renkontiĝas, Irlando, estas unikajo el lingva vidpunkto. La sola sendependa lando en Eŭropo kies nacia lingvo, unu el la plej malnovaj literaturaj lingvoj de Eŭropo kun skriba literaturo jam en la 6a jarcento, fariĝis malplimulta, kaj preskaŭ tute malaperis dum la 19a jarcento. La lingvo kiu saviĝis 5 minutojn antaŭ noktomezo pro la sendependeco de Irlando en 1922, en 2007 fariĝis oficiala lingvo de EU. Sed, kiel ni pli detale aŭdos dum la kongreso, ankoraŭ ekzistas grandaj problemoj en la lernado de la irlanda kaj uzo de lingvo-orientigaj kursoj baze de Esperanto povus helpi solvi tiujn problemojn.

La progreso de Esperanto, aparte en Bruselo, dum la lastaj jaroj estas mirinda. Kiam mi eklaboris en la Eŭropa Komisiono en 2007, mi eĉ ne rajtis mencii la vorton “Esperanto” en artikolo en oficiala revuo. Nun oni invitas min verki artikolojn pri Esperanto por la sama revuo, kaj oni invitas junajn Esperantistojn prezenti la lingvon dum diskutforumoj ene de la Komisiono. Sed la rifuzo eĉ registri nian proponon pri kantado de la Eŭropa Himno en Esperanto kaj doni okazon al civitanoj decidi mem ĉu ili subtenas tion aŭ ne, montras ke ni ankoraŭ havas farendan laboron.

Nia kerna motivo restas lingva justeco, kaj en Eŭropo kaj en la tuta mondo. Por atingi nian celon de lingva justeco, ni bezonas progreson samtempe en multaj partoj de la mondo. Nia mondoparto nomiĝas Eŭropo kaj ni bezonas strategian pensadon kaj laboron, al kio vi ĉiuj povos kontribui ĉitie. Kiel ni povas praktike helpi progresigi Esperanton en la mondo? Certe ne per nebulaj eldiroj pri la tutmondeco de Esperanto, sed per praktika ĉiutaga laboro kiu alportas etajn sed konkretajn fruktojn en Eŭropo. Tiuj konkretaj progresoj kuraĝigos niajn samideanojn en aliaj mondpartoj.

Seán Ó Riain

Prezidanto de EEU



UACHTARÁN NA hÉIREANN  
PRESIDENT OF IRELAND

**MESSAGE FROM PRESIDENT MICHAEL D. HIGGINS**

Is mór an chúis áthais dom fíorchaoín fáilte chun na hÉireann agus chun na Gaillimhe a fhearadh ar na toscairí atá tagtha chuig comhdháil Esperanto na hEorpa. Tá súil agam go mbainfidh sibh taitneamh as bhur dtréimhse in Éirinn agus go n-éireoidh go geal le bhur gcomhdháil.

It gives me great pleasure to welcome the 9<sup>th</sup> conference of the European Esperanto Union to Ireland and to Galway.

During its 125 years of existence, Esperanto has become a distinctive part of our common European cultural heritage. Esperanto has had a rich and eventful history since it was first launched in 1887 and today has fluent speakers in most countries throughout the world.

Here in Ireland, two of the signatories to the 1916 Proclamation of the Irish Republic, James Connolly and Joseph Mary Plunkett, had studied Esperanto and they subscribed to its message of international peace and friendship based on equality. In a world where conflict is still all too pervasive, this message of peace based on parity of esteem between different peoples remains as relevant and as valid as ever.

I am, therefore, very proud to be patron of the EU Esperanto Conference and I wish all delegates a fruitful five days and a very enjoyable stay in Galway.

Mar sin, is cúis mhór bróid dom bheith i mo phátrún ar Chomhdháil Esperanto an Aontais Eorpaigh agus tá súil agam go mbainfidh sibh taitneamh agus tairbhe as na cúig laethanta anseo i nGaillimh.

Michael D. Higgins  
Uachtarán na hÉireann  
President of Ireland

28 June, 2012

# MESAĜO DE LA ALTA PROTEKTANTO, PREZIDANTO DE IRLANDO



PATRONO - Michael D. Higgins, prezidento de Irlando  
ÉARLAMH - Micheál D. Ó hUiginn, Uachtarán na hÉireann  
PATRON - Michael D. Higgins, President of Ireland

## Mesaĝo de Prezidanto Michael D. Higgins

Estas por mi granda plezuro elkore bonvenigi la partoprenantojn de la 9-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio al Irlando kaj al Galivo. Mi esperas ke vi ĝuos vian restadon en Irlando kaj ke tre bone sukcesos via kongreso.

Dum la 125 jaroj de ĝia ekzisto Esperanto iĝis distinga parto de nia komuna eŭropa kultura heredaĵo. Esperanto spertis riĉan kaj eventoplenan historion ekde ties unua lanĉo en 1887 kaj hodiaŭ ĝi havas fluajn parolantojn en la plejmulto de landoj tra la mondo.

Ĉi-tie en Irlando, du el la subskribintoj de la Proklamo de Irlanda Respubliko en 1916, James Connolly kaj Joseph Mary Plunkett, estis studentaj Esperanton, kaj subtenis ĝian mesaĝon de internacia paco kaj amikeco surbaze de egaleco. En la mondo, kie konflikto estas ankoraŭ tro ofta, tiu mesaĝo de paco surbaze de samniveleco de respekto inter malsamaj popoloj restas tiom grava kaj valida kiel neniam antaŭe.

Do mi tre fieras esti alta protektanto de la Eŭropunia Konferenco de Esperanto kaj mi deziras al ĉiuj partoprenantoj fruktodonajn kvin tagojn kaj tre ĝuindan restadon en Galivo.

Mi esperas ke plaĉos al vi via restado en Irlando kaj ke bone sukcesos via kongreso.

Michael D. Higgins  
Uachtarán na hÉireann  
Prezidanto de Irlando  
La 28-an de junio 2012

## MESAĜO DE ŜTATMINISTRINO DE IRLANDO PRI EŬROPAJ AFEROJ



Lucinda Creighton, T.D

Céad míle fáilte romhaibh go léir go hÉirinn agus chun na Gaillimhe! (Cent mil bonvenoj al vi ĉiuj al Irlando kaj al Galivo!). Kiel Ŝtatministrino pri Eŭropaj Aferoj, mi kun granda plezuro bonvenigas vin ĉiujn, paroprenantojn de la 9-a Kongreso de Eŭropa Esperanto-Unio al Irlando kaj al Galivo. Bedaŭrinde ne eblis ke mi mem malfermu vian kongreson, sed mi nun uzas la okazon por sendi al vi miajn bondezirojn por sukcesaj diskutoj kaj ĝuinda restado en Irlando.

Esperanto aĝas 125 jarojn ĉi-monate, kaj verŝajne estas la sola vivanta lingvo kiu havas kaj naskiĝlokon kaj naskiĝdaton: Varsovio, la 26-an de julio 1887. Ĉar la lingvo pluvivis dum du mond-militoj kaj konservis komunumon de uzantoj dum kvin generacioj en ĉiuj eŭropaj landoj, ĝi estas eta sed grava parto de la komuna kultura heredaĵo de Eŭropo. La Eŭropa Komisiono agnoskis tion en 2009 kiam ĝi nomumis Eŭropan Esperanto-Union kiel unu el la 29 organizaĵoj de la Civitanso-cia Platformo por Multlingvismo.

La unuan lernolibron de Esperanto en la angla lingvo verkis Richard Geoghegan, flua parolanto de la irlanda, kiu ankaŭ respondecis pro la irlanda verda kiel koloro de la Esperanto-movado. Via neŭtrala lingvo eble povus kontribui al la celo plifortigi kumunan eŭropan identecon harmonie kun naciaj identecoj, kaj tiel pligrandigus solidarecon inter la popoloj de unuiĝanta Eŭropo.

En la nuna periodo de tutmondaj ekonomiaj malfacilaĵoj via kongresa temo de pli efika kaj malpli kosta lingvolernado en Eŭropo certe venas en taŭga momento. Inter viaj prelegantoj estas pluraj spertuloj pri lingvolernado, kaj mi fidus ke viaj konkludoj estas praktike utilaj al lingolernantoj ĉie en Eŭropo.

Mi deziras al vi daŭran sukceson en via grava laboro – Go n-éirí go geal libh (Grandan sukceson)

Lucinda Creighton, T.D

Ŝtatministrino pri Eŭropaj Aferoj

**Message from the Minister of State for European Affairs, Lucinda Creighton, T.D.**

Céad míle fáilte romhaibh go léir go hÉirinn agus chun na Gaillimhe! As Minister of State for European Affairs, it gives me great pleasure to welcome the delegates to the 9<sup>th</sup> conference of the European Esperanto Union to Ireland and to Galway. Unfortunately it was not possible for me to open your conference personally, but I now avail of this opportunity to send you my best wishes for successful deliberations and an enjoyable stay in Ireland.

Esperanto is 125 years old this month, and is arguably the only living language which has both a date and place of birth: 26 July 1887 in Warsaw. Surviving through two world wars and retaining a diaspora community of regular users through five generations in all European countries, it constitutes a small but important part of Europe's common cultural heritage. This was recognised by the European Commission in 2009 when it nominated EEU/European Esperanto Union as one of the 29 constituent organisations of the Civil Society Platform on Multilingualism.

The first Esperanto textbook in English was written by Richard Geoghegan, a fluent Irish speaker, who was also responsible for the adoption of Ireland's green as the colour of the Esperanto movement. This neutral language may be able to contribute to the goal of strengthening a common European identity in harmony with national identities, leading to enhanced solidarity between the peoples of an integrating Europe.

At a time of worldwide economic difficulty, your conference theme of more efficient and effective language-learning in Europe is certainly topical. Your speakers include a number of experts on language-learning, and I am confident that your conclusions will be of practical use to language-learners throughout Europe.

I wish you continued success in your endeavours – Go n-éirí go geal libh!

Lucinda Creighton, T.D  
Minister of State for European Affairs

Oni povas diri ke ekzistas tiom da Irlandoj kiom da irlandanoj – ĉiu portas la propran Irlandon en la kapo kaj en la koro.

James Joyce forlasis Irlandon en 1904 kaj neniam plu loĝis tie ĝis lia morto en 1941 – sed dum la tuta vivo li skribis pri nenio alia. La angla aŭtoro G.K. Chesterton iam skribis ke en Irlando “ĉiuj militoj estas gajaj, sed ĉiuj kantoj estas malgajaj”. Pro la bezono pravigi la anglan koloniadon de Irlando la lando ricevis multajn kritikojn dum jarcentoj, aparte de la koloniistoj mem! Sed eĉ la plej akraj kritikistoj akceptis ke irlandia tradicia muziko estas ĉiele bela. Kaj ni memoru la plej konatan vorton en Esperanto kiu venis de la irlandia – viskio (irlande *uisce beatha*, akvo de vivo).

Mia Irlando estas aparte lingvocentra. Jam kiel infano mi eksciis ke nia parto de Irlando perdis la propran lingvon dum la vivojaroj de mia praavo. Ŝokis min la anglaj versioj de irlandaj loknomoj, kiuj signifas nenion angle kaj nur sencele iom kaŝas la irlandan signifon. Mia patro parolis nur angle krom proksimume 400 irlandaj vortoj kiujn ĉiuj uzadis. Sed li konsideris la irlandan la sola nacia lingvo de Irlando, ‘nia lingvo’, kaj en tio li estas tipa por granda parto de la irlandia popolo, kies sinteno reflektiĝas en la Konstitucio de Irlando.

La irlandia estas kelta lingvo, tre parenca al la skotgaela, kaj iom malpli simila al aliaj keltaj lingvoj kiel la kimra kaj la bretona. Antaŭ 2.000 jaroj keltoj troviĝis tra la tuta Eŭropo, de Irlando ĝis Galacio en Hispanio, Galizio en Pollando kaj Galatio - la nuna Turkio. La leteroj de Sankta Paŭlo al la Galatoj, kiuj loĝis apud Ankaro, iris al popolo kies lingvo similis la irlandan. Jam fine de la 6-a jarcento, en la jaro 597, estis verkita la unua literaturaĵo irlande, *Amra Choluim Cille*, lamento por la ĵus mortinta unua sanktulo kiu naskiĝis en Irlando. Tiel ĝi estas unu el la unuaj literaturaj lingvoj de Eŭropo, post la helena kaj la latina. Ekzistis jam vasta literaturo en la irlandia kiam la cetera Eŭropo ankoraŭ skribis latine.

Dum pli ol mil jaroj la irlandia estis la lingvo de la tuta Irlando kaj preskaŭ la tuta Skotlando – tion oni povas klare vidi eĉ hodiaŭ en la skotaj lokonomoj. Meze de la 19-a jarcento preskaŭ 5 milionoj parolis irlande. Tiam venis la malsatego de 1845-47, kiam inter 1 kaj 2 milionoj mortis pro malsato. En la bazaj lernejoj, kiuj fondiĝis tra la tuta lando en 1831 por instrui la irlandan, eĉ paroli ĝin estis nun malpermesita. La plej granda politikisto de la 19-a jarcento en Irlando, Daniel O’Connell, konsilis paroli nur angle kun infanoj. Kvankam li denaske parolis irlande, li povis politike progresi en la brita Parlamento nur angle – pere de tiu lingvo li sukcesis atingi voĉdonrajton por la 90% de katolikaj irlandanoj en la jaro 1829. Pro tio fine de la 19a jarcento nur 3% parolis irlande hejme. Se Irlando ne sendependiĝus en 1922, la lando certe estus tute perdinta sian lingvon. Sed la simbola valoro de la lingvo restis, kaj restas, malgraŭ ĉio. En 1919 la unua libere elektita parlamento de Irlando deklaris sendependecon en tri lingvoj: unue irlande, due france, kaj nur



trie en la angla. Ĝis 1984, kiam aperis komuna EU-pasporto, irlandaj diplomataj pasportoj estis en 2 lingvoj – la irlanda kaj la franca. Pasintjare dum la parlamentaj elektoj, la ĉefoj de la 3 pli grandaj politikaj partioj faris unuhoran televidan debaton en la irlanda. Kaj ekde 2007 oni ĉiam pli ofte aŭdas la irlandan en EU-institucioj en Bruselo kaj Strasburgo.

Kial tiom substreki la lingvan aspekton de Irlando? Ĉar ĝi estas unikaĵo kaj neniu alia temo estas tiom kontraŭdira inter irlandanoj.

Ekonomie Irlando multe progresis kiel membro de EU ekde 1973, ne pro direkta financa helpo, sed pro la ebleco eksporti sendogane al merkato de 500 milionoj da konsumantoj. Politike ĝi ankaŭ progresis, fariĝis pli sendependa pro la vasta pligrandiĝo de komercaj rilatoj kun aliaj EU-landoj, kaj ankaŭ pli paca – finiĝis la militaj flankoj de la Nord-Irlanda situacio, kaj iom post iom la rilatoj ene de Nord-Irlando, inter Nord-Irlando kaj la Respubliko kaj inter la tuta Irlando kaj Britio pli kaj pli normaliĝas. En 2011 estis la unua vizito de brita reĝino al Irlando ekde pli ol jarcento – kaj ŝi publike parolis irlande. Preskaŭ semtempe venis usona prezidanto Obama, kiu havas irlandajn antaŭulojn, kaj kiu ankaŭ publike parolis irlande!

Tradicie Irlando estis grandparte agrikultura lando, kiu plejparte eksportis lakton, bovaĵon kaj ŝafaĵon. Agrikulturo ankoraŭ gravas, tamen nun ĝi estas mapli ol 8% de la irlandaj eksportaĵoj. La plej grandan parton de irlandaj eksportoj produktas pli ol 1200 eksterlandaj firmaoj – usonaj, japanaj, germanaj – kiuj investis en la lando.

Tradicie Irlando estis tre konservema katolika socio – oni uzis la esprimon “pli katolika ol la papo”. Ankaŭ tio ŝajnas ŝanĝiĝi, aparte pro skandaloj pro la seksa misuzo de infanoj far pastroj katolikaj – pro la kaŝado de tiu misuzo dum multaj jaroj, Irlando fermis sian ambasadon en Vatikano en 2011, kaj la irlanda ĉefministro, mem tre religiema katoliko, tre forte kritikis Vatikanon en la irlanda parlamento.

Unu aferon kiun vi verŝajne rapide rimarkos estas la ŝercemo de irlandanoj. Tradicie evoluadis tre forta humursento – kelkaj diras ke tio okazas kiel rekompenco al nia malĝoja historio. Mi forte esperas, ke vi ĝuos vian restadon en Irlando kaj eklore dankas vin pri tio, ke vi venis.

Seán Ó Riain



## GALIVO

Galivo (Gaillimh/Galway), la pitoreska ĉefurbo de la okcidenta parto de Irlando, havanta nun 70,000 enloĝantojn, el kiuj pli ol 16.000 estas studentoj, situas ĉe Atlantika Marbordo.

Dum la lastaj 40 jaroj la urbo kreskis pli rapide ol iu ajn alia irlanda urbo. La irlanda tradicia muziko tre fortas en Galivo, kiu estas konata kiel la dulingva ĉefurbo de Irlando – kvankam plejmulte anglalingva, kiel aliaj irlandaj urboj, oni pli ofte aŭdas la irlandan lingvon en Galivo ol aliloke en la lando.

Oni povas ankaŭ bone manĝi kaj trinki en Galivo – ekzistas multaj bonaj manĝejoj kaj trinkejoj. Unu el la plej bonaj restoracioj de la urbo estas nia kongresejo—la hotelo Ardilaun! Kiel oni diras irlande, *sláinte!* (je via sano!).



# KONGRESA PROGRAMO

La programeroj okazas en la granda salono krom tiuj ĉe kiuj estas menciite ke ili okazas en la eta salono (nur marde kaj ĵaŭde).

## Lundo, la 16-a de julio 2012

10.00 – 16.00: *akcepto de kongresanoj kaj loĝigo*

16.00 – 18.00: Solena malfermo:

- Irlanda kaj eŭropa himnoj, salutvortoj de la prezidanto de EEU, lego de la salutoj de la alta protektanto kaj de la irlanda ministrino pri EU-aferoj, Lucinda Creighton, TD, salutvorto(j) de la reprezentantoj de la urbo, enkonduko de Seán Ó Riain al la ĉeftemo, prelegeto de Renato Corsetti pri 125 jaroj de Esperanto, Transdono de premio Cigno far Jozef Reinvar
- 18.00 – 19.00: D-ro Michele Gazolla: "Lingvaj politikoj kaj ekonomiko: aliroj kaj rezultoj"
- 20.30 – 22.00: Irlanda vespero

## Mardo, la 17-a de julio 2012

Unua sesio de la konferenco pri propedeŭtiko: Prezidas: d-ro Seán Ó Riain

- 9.00 – 10.00: Angela Tellier MA., BEd: "Survoje al plurlingveco pere de Esperanto: lastatempaj studoj en anglaj bazlernejoj"
- 10.00 – 10.30: Profesoro Renato Corsetti: "Teoriaj bazoj de instruprojektoj kun Esperanto"
- 10.30 – 10.50: Paŭzo
- 10.50 – 12.00: Seán Ó Cuirreáin, Irlanda komisiito pri Lingvoj: "Lingvoj en irlando kaj la laboro de la komisiito pri lingvoj"

12.00 – 14.00: Paŭzo por tagmanĝo

14.00 – 17.00: Asembleo de EEU (fermita parto)

13.00 – 16.00: Vizito de la urbo Galivo – MENDEBLA DUM LA UNUA KONGRESTAGO

15.00 – 17.00: Kunveno de la Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio (TEĴA) – eta salono

17.00 – 18.00: Dr-o Seán Ó Riain: Prelego pri irlanda historio

17:30 – 18:30: Niels JL Iversen: "Vortaretoj kiel ilo por la vortolernado" (eta salono)

18.00 – 19.00: Irlanda eksprese – instruas Seán Ó Riain

18.30 – 19.00: Legado de prelego de Etsuo Miyoshi pri nova strategio en Eŭropo (eta salono)

20.30 – 22.00: Kabaredo de Saša Pilipović kaj Georgo Handzlik "Kompleta (preskaŭ) historio de Universalaj Kongresoj – kabareda farso pri kutimoj de esperantistoj"

# KONGRESA PROGRAMO

Angulo de E@I en la eta salono:

10.00 – 10.45: Prezento de E@I

10.45 – 11.30: Eldonaĵoj de E@I – furoraj libroj kaj diskoj pri/en Esperanto

## **Merkredo, la 18-a de julio 2012**

Dua sesio de la konferenco pri propedeutiko: Prezidas mag. Nikola Rašić

- 9.00 – 9.50: Profesoro Wim Jansen, Amsterdama Universitato: "La lernebleco de Esperanto"
- 9.50 – 10.40: Tim Morley MSc, MPhys: "Springboard to Languages: vidpunkto el la klasĉambro"
- 10.40 – 11.00: Paŭzo
- 11.00 – 12.00: D-ro Nollaig Ó Muraíle, Galiva Universitato: "La lingvoj kiujn oni parolas en Irlando"

12.00 – 14.00: Tagmanĝopaŭzo

13.00 – 17:30: Ekskurso al Kinvara kaj la ŝtona regiono Burren - MENDEBLA DUM LA UNUA KONGRESTAGO

14.00 – 15.00: Mag. Nikola Rašić: "Lingva situacio de Romaoj en Eŭropa Unio"

15.00 – 16.00: D-ro Paul Gubbins: Prelegetoj pri originala Esperanto-literaturo

16.30 – 18.00: Ronda tablo pri la popola iniciato en EU proponita de EEU kaj pri la agado de EEU en la Platformo pri multlingvismo de la Eŭropa Komisiono

18.00 – 19.00: Irlanda eksprese – instruas Seán Ó Riain

20.30 – 22.00: Kantkoncerto de Georgo Handzlik kaj JoMo

## **Ĵaŭdo, la 19-a de julio 2012**

Tria sesio de la konferenco pri propedeŭtiko: Prezidas profesoro Wim Jansen

- 9.00 – 10.00: Mag. Zlatko Tišljar "Propedeŭtika eksperimento en Slovenio-Kroatio-Austrio de 1993-1995"
- 10.00 – 10.45: D-ro Seán Ó Riain: "La lernado de la irlanda lingvo: ĉu helpe de Esperanto?"
- 10.45 – 11.00: Paŭzo
- 11.00 – 12.00: D-ro Eugene McKendry, Belfasta Universitato: "Superrigardo de la Instruado de Lingvoj en Norda Irlando"

12.00 – 14.00: Tagmanĝopaŭzo

14.00 – 16.00: Kunsido de Internacia Esperanto-Asocio de Juristoj (eta salono)

## KONGRESA PROGRAMO

- 14.00 – 14.30: Maja Tišljar raportas pri la Triesta konferenco de EEU  
14.30 – 15.15: Zlatko Tišljar raportas pri la Jaro de Tibor Sekelj  
15.15 – 15.45: Nico Huurman: "Seminario pri lingva politiko de TEJO"  
**16.00 – 18.00: Malferma Asembleo de EEU**  
18.00 – 19.00: Andre Staes: "Lingvaj roloj en Eŭropo estinto kaj estonto" (eta salono)  
**19.00 – 21.00: Bufedo – MENDEBLA DUM LA UNUA KONGRESTAGO**  
21.00 – 22.30: Teatraĵo de Georgo Handzlik "Ludoviko"  
**Angulo de E@I en la eta salono:**  
10.00 – 10.45: Moderna lingvolernado – E@I kaj ĝiaj lingvaj projektoj  
10.45 – 11.30: Enkonduko al Vikipedio – iĝu aktiva uzanto kaj kontribuu

### Vendredo, la 20-a de julio 2012

- 9.00 – 10.00: Diskuto kaj konkludoj de la konferenco pri propedeŭtiko  
**10.00 – 11.00: Solena fermo:**
- Raporto de Seán Ó Riain pri la kongresa laboro kaj akceptitaj dokumentoj, pri reago de la galiva publiko, pri nova maniero organizi kongreson kun profesia neesperantista teamo, raporto de Zlatko Tišljar pri la estonta laboro de EEU, Eŭropa himno
- 11.15: Foriro al la postkongreso  
Hejmeniro

### TAGMANĜO EN LA KONGRESEJO

Rabatitaj tagmanĝmenuoj en la kongresejo estas mendeblaj la antaŭan tagon inter la 8.30 kaj la 9.30 matene. Elekteblas inter a sekvontaj tagmanĝoj:

- Ĉefa tagmanĝplado kaj taso da teo aŭ kafo Prezo: 13,95 €
- Supo, sandviĉo kaj taso da teo aŭ kafo Prezo: 10,95 €
- Sandviĉo kaj taso da teo aŭ kafo Prezo: 6,25 €
- Supo kun pano Prezo: 4,75 €

### DUMKONGRESAJ EKSKURSOJ

Sekvontaj dumkongresaj ekskursoj estas mendeblaj dum la unua kongrestago:

- Vizito de la urbo Galivo Prezo: 8 €
- Ekskurso al Kinvara kaj la ŝtona regiono Burren Prezo 30 €


# LISTO DE ALIĜINTOJ

<b>Nomo</b>	<b>Lando</b>	<b>Nomo</b>	<b>Lando</b>
Laimutė Čirvinskienė	Aŭstrio	Dominique Couturier	Francio
Flory Witdoeckt	Belgio	Denise Le Fol Prié	Francio
Walter van den Kieboom	Belgio	Jean-Marie Lot	Francio
Sandra Schweder	Belgio	Marithé Regueme	Francio
Remy Sproelants	Belgio	Anne-Catherine Defay	Francio
Eduard Kusters	Belgio	Francis Soghomonian	Francio
Katja Lödör	Belgio	Hannes Larsson	Francio
Hans Delnat	Belgio	Gisèle	Francio
Lode Van de Velde	Belgio	Elisabeth Larsson Garden	Francio
Barbara Poterucha	Belgio	Salomé Hug	Francio
Christiane Geudens	Belgio	Lucie Hulot	Francio
Paula Cristina Medve	Brazilo	Michèle Longue épée	Francio
Maria Teresa Medve	Brazilo	Marie-Sylvie Julian	Francio
Paul Gubbins	Britio	Martine Freydier	Francio
John Gobourne	Britio	Elisabeth Barbay	Francio
Kimie Markarian	Britio	Bernard Reiffsteck	Francio
June A. Campbell	Britio	Helena Marlin	Francio
Angela Tellier	Britio	Jean-Marc Leclercq - JOMO	Franco
Dominique Tellier	Britio	Alfred Kobina Arthur	Ganao
Peter Redfarn	Britio	Dominique Marcon	Germanio
Heather Turnbull	Britio	Andreas Kueck	Germanio
Malcolm Jones	Britio	Peggy Ley	Germanio
Marteno Miniñ	Britio	Ilona Schmidt-Bohr	Germanio
Charles Dornan	Britio	Wolfgang Bohr	Germanio
Arnold Pitt	Britio	Sabine Hauge	Germanio
Tim Morley	Britio	Peter Hauge	Germanio
Marek Blahuš	Ĉeĥio	Uwe Joachim Moritz	Germanio
Erik Mortensen	Danio	Ursula Schnelle-Moritz	Germanio
Astrid Birkbak	Danio	Johann Pachter	Germanio
Ileana Schrøder	Danio	Gerda Rudolph	Germanio
Niels J. Legarth Iversen	Danio	Horst Schickschneit	Germanio
Tuomo Grundström	Finnlando	Barbara Nollen	Germanio
Louise Marin	Francio	Wolfgang Loose	Germanio
Jean Marin	Francio	Gisela Loose	Germanio
Maurice Gourichon	Francio	Heinz-Wilhelm Sprick	Germanio
Geneviève Gourichon	Francio	Manfred Westermayer	Germanio
Ginette Martin	Francio	Wolfgang M. Schwarz	Germanio
Simone Cajelot	Francio	Barbara Schwarz	Germanio




## Al Eŭropo



**Teksto: Umberto Broccatelli**



Kantu kune amikaro,  
ni la ĝojon festas nur,  
nek rivero nek montaro  
plu landlimoj estas nun.  
Ho Eŭropo, hejmo nia,  
tro daŭradis la divid'.  
Nun brilegu belo via,  
ĉiu estas via id'.  
Via flago kunfratigas  
homojn post milita temp',  
via leĝo nun kunigas  
civitanojn en konsent'.




De l' Malnova Kontinento  
ĵus ekstaris la popol';  
gvidas ĝin tre nova sento  
kaj kuniga forta vol'.  
Sub la ŝildo de la juro  
ni vivados en konkord'.  
Tio estas nia ĵuro:  
unu land' kaj unu sort'.  
Jen ekzemplo por la mondo,  
jen direkto, jen la voj':  
tuthomara granda rondo  
en la paco, en la ĝoj'!




## Tradukoj: Seán Ó Riain

### Don Eoraip




Canaimis le chéile, a chairde,  
Móramis an t-áthas,  
Ní habhainn ná sléibhte,  
Níl aon teorainn feasta.  
Ó, a Eoraip, baile dúinne,  
Rófhada a mhair an roinnt,  
Anois lonraíodh d'áilleachtsa  
Do shliochtusa is ea sinn uile.




Tugann do bhritach le chéile,  
Mar bhráithre, daoine iarchogaidh,  
Anois aontaíonn do dhlíthe  
Saoránaigh le lánchead.

### To Europe



Let us sing together, friends,  
Let us celebrate our joy,  
Neither river, nor the mountains  
No more borders, ne'er again.  
Oh, Europa, our own home,  
You were divided far too long,  
Let your beauty now shine forth,  
From you only all have come.



Your flag now unites as brothers and sisters  
Those whom war did once divide,  
Your own law now brings together  
Citizens in full accord.